

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE OCH NORGE

UTGIVEN AV SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Oficiala organo por Sveda Esperanto-Federacio (S. E. F.) kaj Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.)

4a Jaro
N:o 2.

Redakcio: J. LUNDGREN, Hedemora, J. HELSING, Gävle, H. BONNEVIE, Kristiania. Adreso por korespondado: Gävle, Svedujo. Ansvarig utgivare — Responda eldonanto kaj administranto: W. WAHLUND, Gävle. Prenumerationspris — Abonprezo: i Sverige 1: 50 kr., i Norge 1: 75 kr., eksterlande 1: 1 Sm. (2: — kr.). Lösnummer 15 öre. Annonpris — Anonprezo: 5 öre pr mm.

Februaro
1916.

La Espero.

Förutom fortsättningen på Kapten Klingenberg's mycket beaktansvärda inlägg i fredssaken, kunna bland de manuskript, som ligga färdiga för införande, särskilt nämnas följande översättningar:

Malproksime kaj alte, av Juhani Aho, övers. från finskan av Hilma Hall;

— Kristnaskarbo ĉe aveto, av E. Kirov, övers. från ryskan av Dr A. Fišer, L. K;

Iu, kiu ne ŝatas akvon, av Peter Rosegger, övers. från tyskan;

Mušo, av Rikard Kataliniĉ Jeretov, övers. från kroatiskan av Ivan Stalzer;

Oktobra nokto, ur boken »Himmelandsbor» av Johannes V. Jensen, övers. från danskan;

La novaj sonoriloj, av Ady Endre, från ungerskan av Rudolf Rajczy.



Meddelande.

La Esperos spalter äro ej upplåtna för meningsutbyten angående politik, religion eller liknande frågor. Om sådant ämne dock i undantagsfall skulle beröras, bör därvid möjligtvis uttalad åsikt betraktas s^o som tillhörande artikelförfattaren, men icke tillskrivas vare sig redaktionen eller Esperantorörelsen dess helhet.

Något om ledande av undervisning i Esperanto.

För att leda en esperantokurs fordras av ledaren ej allenast kännedom i språket, utan fastmera ägande av förmåga att entusiasmera eleverna för Esperantos innebörd. Det som ej från början upptagit detta på skolschemat, skall under kursens gång erfara att åtskilliga försvinna från lärokursen för att ej mera återvända vare sig till fortsatt studium eller till Esperanto.

Beträffande valet av undervisningsmaterial, spelar detta ej s^o väsentlig roll, enär det i främsta rummet åligger läraren att själv söka popularisera ämnet på ett instruktivt sätt. Att enbart använda den vid vissa skolor existerande pluggmetoden är ej att rekommendera och allraminst då eleverna höra till den kroppsarbetande klassen. Under den lilla tid, som eleven har till övers för studier, efter att hava arbetat hela dagen, måste undervisningen lämpas efter dennes förmåga att tillgodogöra sig ämnet, med andra ord: läraren skall vara för eleven och ej tvärtom.

Kursledaren bör undvika att sätta grammatiken främsta rummet, enär kursens obetydliga längd av ex. 20 lektioner ej medgiva något ingående grammatikstudium, och dessutom en del elever anmält sitt deltagande för att lära Esperanto, men därvid ej räknat med grammatik, som och för sig skulle fordra en längre tid än hela kursen.

Först i andra rummet skall grammatik förekomma. Först inläres en mindre berättelse utantill och sedermera tillämpar läraren grammatik på densamma. Under kursens gång, t. ex. efter den åttonde lektionen, införas obligatorisk korrespondens med utlänningar och fortsättes därmed till kursens avslutning. En sådan internationell korrespondens jämsides med kursarbetet gör att eleven lyckas på minsta möjliga tid lära sig Esperanto. Av stor betydelse för kursarbetet utgör även övande av sånger med esperantotext. Dessa övningar få ej inkräkta på kurstiden, utan är det lämpligast att, efter det lektionen avslutats, någon tid ex. 30 min. ägnas för sång med ackompanjemang av piano, orgel eller fiol etc.

Här gäller naturligtvis framförallt att läraren låter eleverna redan från och med första lektionen känna den allestädes använda officiella hymnen *La Espero*.

Kursarbetet skall av propagandahänsyn vara offentligt, och böra för Esperanto intresserade inbjudas att övervara lektionerna.

Under kursen föres av ledaren matrikel över deltagarne och skall denna matrikel sedan föreligga till påseende hos vederbörande föreningsstyrelse.

En lärare bör vinnlägga sig om elevernas trevnad under kursen. På honom vilar ansvaret om en kurs blir lyckad eller icke.

Det är ej tillfyllest att en kurs blivit börjad med ett så och så stort antal inskrivna elever, utan det viktigaste är väl dock huru slutresultatet ställer sig och ännu bättre om eleverna fortsättningen ägna.

ât ytterligare utbildning i Esperanto, ävensom bidraga att sprida kännedom om Esperanto bland sina bekanta.

Esperantist.



Meditaĵoj pri alvokoj 1915 de la norvegaj pacamikoj kaj 1914 de la Anti-Oorlog-Raad, kaj propono al konkreta internacia programo por la 3a Haagkonferenco.

De B. Jhss. Klingenberg,
Infanterikapitano.

II.

Pro facile kompreneblaj motivoj, ne estis dezireble por iu neŭtrala ŝtato fari oficialan implikon en la malfacila laboro de la koncerna komitato, kiu siatempe aranĝos por paco la finon de la milito. Sed oni bone povus eliri de tiu supozo, ke en la ambaŭ flankoj de la militfinkomitato troviĝos ankaŭ reale kompetentaj ŝtatviroj, kiuj atentis la revurezultaton de la lasta tempo, kaj ankaŭ estas homoj, kiuj sentas por kaj kun la malfeliĉuloj de nia samtempo kaj reale deziras fari daŭrantan, por la homaro honoran pacon. La nuna diskuto de la pacamikoj eble povas enteni orgrenon uzeblan por tiuj noblaj ŝtatviroj.

La Varberga*) pacrezolucio de 1915 estas konstruita sur la politika eraro, ke la ordigo de la milita fino, estas pozitiva paclaboro. Tiu ordigo estos kompreneble la lasta akto en la milito, kaj la rezultatoj estos akcelitaj kaj realigitaj per la armitaj amasoj de la milito, kaj devas necese celi la certecon de liaj akiraĵoj por la venkinto. Kiam tiu ĉi celo estas gajnata oni komencos meti la soldataron en paca stato. —

Sinjoro Louis de Geer, sveda politikisto kaj pacamiko, diris: »Se la fino estos evidenta venko por la unua parto, tiam verŝajne nenio estos gajnebla; — sed se ĝenerale komuna lacego estos la rezultato, tiam la regnoj espereble komprenos, ke reformoj en la ordigo de la suvereneco kaj en la diplomatia metodo estas necesaj.»

Se granda venkinto, al kiu la

estontfeliĉo ridetas, ne estus influata per nobla reformmovado, tia okaze estas ankoraŭ malplia kaŭzo por esperi, ke la lacegoj plenaj de la turmentoj de malfeliĉoj, estus inspirontaj noblan emon por vidi kunhomojn en pli feliĉaj vivcirconstancoj en la estonto.

Oni bone evitu doni tro grandan signifon al tiu fino de la milito por paco.

Tiu certe havas grandan signifon, sed ĝi ne estas la sola decidonta fakto, kiu karakterizos la venontan, daŭrontan, honoran pacon.

El la nuna milito neniu el la kvin batalantaj imperioj kaj la franca respubliko venos tiel forta kiel granda Britujo en 1815, post ĝia pereigo de la eŭropaj militŝiparoj krom la angla; sed tiu ĉi pozicio ne estis tamen la plej sola momento, kiu karakterizis tiun pozicion kiel mondregnon, kiun Anglujo antaŭ kaj precipe post la Boermilito estas kumitiginta.

Kiam iam la paco venos, tiam estos eble ne malgrave ke la 7 nun batalantaj regnoj trovos la paralele laborantan internacian pacŝtaton kiel faktan realigitan de la neŭtralaj ŝtatoj; ĉar la 7 nun batalantaj regnoj ne devas povi paralizi la agon de la neŭtralaj ŝtatoj per ilia intercela konsento pri plia monprunto por restarigi tiun kulturon, kies detruigo ilia milito kaŭzis, kaj oni devas memori, ke la venonta paco estos kunlaborado de tiuj ĉi nun militantaj regnoj kaj la neŭtralaj ŝtatoj.

El la rilatoj dum la neŭtraleco en la nordaj ŝtatoj antaŭiras ankaŭ la 3a punkto en tiu propono, kiu finos tiun ĉi meditaĵon. En la nuna tempo, tiel plena je predikoj kontraŭ kaj blanka kaj nigra sklavkomerco, — kontraŭ drinkemo kaj malbonmoreco, — kontraŭ mortigo kaj mortighelpo, rabado kaj interbataloj, oni forgesas efektive rimarki, kiel publike senhonorigantaj estas tiaj spekulacioj, kiaj estas traktataj en tiu punkto.

Dum la 8a norda kongreso 1915 la ekpensoj de ĉiuj parolantaj pacamikoj ne sukcesis prezenti proponon prenitajn pere el la ĉiŭtaga vivo, kiu batalas por subteni nian neŭtralecon kaj tiamaniere montri en kia alta grado ni ĉagreniĝas pri tiu trafiko, kiu spekulacias en la milito mortiganta malfeliĉajn kunhomojn. Tiu-ĉi propono estas necesa, por ke la konvencio pri la rajtoj de neŭtralaj regnoj de 18/10-7 estos deviganta por la neŭtralaj ŝtatoj, kaj ĝi

ankaŭ havas tian karakteron, ke la popoloj mem povas aprobi ĝin kiel nacian leĝon por resti honore en sia agado. Tiu formo, kiun la civila ŝipveturado havis dum la lasta milito per la submaraj boatoj, per kiuj la nemilita ŝipo estas detruita, kaj ankaŭ la maristoj submarigitaj sen antaŭsciigo, aŭ metitaj en malgrandan boaton sur la granda maro, devas pravigi tiun proponon, ĉar estas antaŭvideble, ke la ŝipveturado per tiu aranĝo estos konsiderinde pli malgranda, ol se oni ne havos tian leĝon.

Per la diversaj eksportmalpermesoj ordonitaj de la registaroj, tiu propono estas jam bone konata en la nordaj regnoj.

Pri la marrabista praktiko, ke la militŝipoj prenas al si la rajton inspekti neŭtralajn ŝipojn, kaj militi per malsategigo kontraŭ la originaj malamikoj, ĉiu komprenas, ke pacagado nur per internacia paralele laboranta pacŝtato, registaro kaj internacia pacparlamento povas kontraŭlabori per pacrimedoj la kondiĉojn por la marrabado, kaj malpliigi la necesojn por la ŝipveturado dum la milito de malsategigo.

La Varberga pacrezolucio raportas al ni, ke Svedujo suferas, kaj estas ofendita de la militŝtato de Eŭropo, kaj ke la pacamikoj deziras kunlaboradon de la skandinavaj registaroj kaj defendparlamentoj pri tio, sed ĝi povas ne prezenti konkretan proponon, kiu solvus la problemon. Tio-ĉi estas tre malsukcesa kiam la programo pretendas ĉesigi ne malpli ol la tutan sistemon de Eŭropo. Tiel naiva estas ankaŭ la Haaga programo, kiu dum la sama spirado nomas malpliigon de la elspezoj por militŝiparoj kaj la malhelpon de la marrabado, tamen ne atentante la signifon, kiun havas internacia pacregistaro kaj internacia pacparlamento, kiuj estas la konsekvenco de ĝia ĝenerala programo, kiam oni deziras solvi tiun marrabdemandon.

Havante la nomitajn internaciajn pacinstituciojn kun radiko en la naciaj pacparlamentoj (pakkonsilantaroj), oni povos fari statistikon pri la bezonoj, kiujn la ŝtatoj devas havi por esti konservotaj sufiĉe longe kiel neŭtralaj ŝtatoj ĝis ekstre ordinara rimedoj estus trovotaj de la internacia pacparlamento, por la daŭra ĉesto de tiuj-ĉi bezonoj dum milito. Dum la paco tiu-ĉi statistiko estas per internacia registaro telegrafe raportita al la diversaj ŝtatoj kun admono al la nacia pacparlamento korekti montritajn man-

*) Urbo en Svedujo.

kojn, kaj samtempe estas donita el la pacbankoj tiun pli malaltan kurson de monoj de la koncerna lando, — kies malpli profita kurso restos senŝanĝa ĝis la mankoj estos efektive korektitaj.

Eĉ se aliaj momentoj ol tiuj-ĉi antaŭmetitaj povas kaŭzi diversajn laborojn, tiam mi ne vidas ne venkeblajn malfacilaĵojn por starigi estontan memhelpon, sen okazigo de ne bone almezurita kaj ne normale pasanta laborado en la lando.

S:ro Dr Nilsson, Örebro, dum la Kopenhaga packongreso en sia parolado »per kiuj rimedoj oni povas estonte fari malebla la militon» estas la sola persono, kiu palpetante tuŝis la internacian »mondparlamenton por reguli ĉiajn, diplomatajn, ekonomiajn kaj kulturajn popolinterezojn kaj por doni kviton al la Haag-konferenco, kiu estas parodio de popolkunveno, tial ke nenia decido valoras se ĝi ne estas unuvoĉe aprobita». La konkludo de Dr. Nilsson — tre longa rezolucio — estis ne referita. Espereble oni akceptos tiun pli malfrue.

Post kiam la submarboatoj treege danĝerigas tiun ĉi marrabadon, ankaŭ estas multe pli malfacile meti militajn rimedojn aŭ bone almezuritan, marstrategaĵon, agon kiel protekton por la senkulpaj ŝipoj. Tiu cirkonstanco kaŭzos, ke la manieroj tie-ĉi antaŭmetitaj havas pli multe da valoro, — se oni entute konsideras homojn tiel valoraj, ke oni deziras elspezi ion por subteni per pacaj rimedoj la internacian pacon.



La eŭropanoj en Ŝang-Haj.

Ĉapitro el »Tartarin de Tarascon»
de Alphonse Daudet.¹⁾

Unufoje Tartarin preskaŭ estus forironta, forironta je granda vojaĝo.

La tri fratoj Garcio-Camus, Tarasconaj negocistoj en Ŝang-Haj, proponis al li la estradon de unu el siaj kontoroj tie. Tio certe estus okupo konvena al Tartarin. Konsiderindaj negocoj, tutmondo da komizoj estrotaj, rilatoj²⁾ kun Rusujo, Persujo, Azia Turkujo, je unu vorto: la Supera Komerco.

En la buŝo de Tartarin tiu ĉi

esprimo: »la Supera Komerco», sonis tre fiere.

La firmo Garcio-Camus cetere havis la avantaĝon³⁾, ke tartaroj kelkfoje vizitis ĝin. Tiam oni rapide fermis la pordojn. Ĉiuj komizoj prenis armilojn, oni hisis la konsulejan flagon, kaj paf! paf! tra la fenestroj, al la tartaroj.

Mi ne bezonas rakonti, kun kia entuziasmo Tartarin-Quichotte⁴⁾ ekakceptis tiun ĉi proponon, sed — bedaŭrinde — Tartarin-Sancho ne aŭskultis per la sama orelo⁵⁾, kaj, ĉar li estis pli forta, la afero ne okazis⁶⁾. En la urbo oni multe parolis pri tio. Ĉu li vojaĝos? Ĉu li ne vojaĝos? Oni vetis por jes, oni vetis por ne. Tio estis grava okazaĵo⁷⁾. . . Fine, Tartarin ne vojaĝis, sed tiu historio ĉiam estis por li granda honoro. Preskaŭ esti vojaĝonta al Ŝang-Haj, kaj efektive alveni tien, estis en Tarascon konsiderate kiel egale. Pro la multa parolado pri la vojaĝo de Tartarin, oni fine kredis, ke li estas reveninta, kaj en la vesperoj en la societa rondo ĉiuj sinjoroj demandis lin pri la vivado en Ŝang-Haj, pri la moroj, klimato, opio, Supera Komerco.

Tartarin, tre bone informita, plezure rakontis la deziratajn detalojn. Iom post iom la brava viro⁸⁾ mem ne sciis tute certe, ĉu li ne vojaĝis al Ŝang-Haj, kaj tial — kiam li la centan fojon rakontis pri la atako de la tartaroj — li tre nature diris: »Tiam mi armis miajn komizojn, hisis la konsulejan flageton, kaj paf! paf! tra la fenestroj, al la tartaroj!» Aŭdante tion ĉi tremis la tuta rondo.

— Sed tiaokaze⁹⁾, via Tartarin estis ja terura mensoganto.

— Ne! milfoje ne! Tartarin ne mensogis.

— Tamen, li devis bone scii, ke li neniel vojaĝis al Ŝang-Haj.

— Ho! sendube¹⁰⁾, li sciis tion. Sed nur...

Sed nur... aŭskultu bone tion ĉi. Oni devas lerni, unufoje por ĉiam, kio estas la famo pri mensogemo, aljuĝata de la homoj en la Nordo al la suduloj¹¹⁾. Ne ekzistas mensogantoj en la Sudo, nek en Marseille aŭ Nîmes, nek en Toulouse aŭ Tarascon¹²⁾. La sudulo ne mensogas; li trompas sin. La veron li ne diras ĉiam, sed li kredas ke li diras ĝin. Por li la mensogo ne estas mensogo, ĝi estas iaspeca ŝajniluzio¹³⁾. . .

Jes, ŝajniluzio! Por bone kompreni tion, vi mem iru al la sudo, kaj vi vidos. Vi vidos tiun strangan landon, kie la sunlumo alifigu-

ras¹⁴⁾ ĉion, kaj faras ĉion pli granda ol laŭ la naturo. Vi vidos la malgrandajn altaĵojn de Provence, kiuj ne estas pli altaj ol la monteto Montmartre¹⁵⁾, sed aspektas gigantaj; vi vidos la kvarangulan domon¹⁶⁾ en Nîmes¹⁷⁾ — malgranda artobjekto por bretaro¹⁸⁾ — kiu ŝajnos al vi egale granda kiel Notre-Dame¹⁵⁾. . . Vi vidos... Ho! la sola mensoganto en la Sudo, se iu tia ekzistas, ĝi estas la sunbrilo. Ĉion, kion ĝi tuŝas tie, ĝi troigas¹⁹⁾. Kio estis Sparto en sia epoko de brilo²⁰⁾? Iu urbeto²¹⁾. . . Kio estis Ateno? Nenio pli ol duaranga provincurbo... kaj tamen en la historio ili aperas al ni kiel metropoloj. Jen tio, kion la sunbrilo faris...

Ĉu nun vi miros, ke la sama sunbrilo, radiante sur Tarascon, povis krei bravan komandanton Bravida el la maljuna laŭtitola ekskapitano Bravida⁴⁾, baobabon²²⁾ el napo⁴⁾, kaj el viro, kiu preskaŭ estis vojaĝonta al Ŝang-Haj, viron, kiu estis tie?

¹⁾ Se La Espero 1915, januaro.

²⁾ förbindelser.

³⁾ förmånen.

⁴⁾ syftar på vad som berättas på andra ställen i boken.

⁵⁾ hörde icke med samma öra: hade en annan uppfattning.

⁶⁾ saken blev icke utav.

⁷⁾ eller: ökazo; tilldragelse, händelse.

⁸⁾ den duktige mannen.

⁹⁾ Men i sådant fall.

¹⁰⁾ utan tvivel.

¹¹⁾ vad det är, det rykte om lögnaktighet, som av människorna i norden tilldömes (tillskrives, tillägges) sydboarna.

¹²⁾ städer i södra Frankrike.

¹³⁾ synvilla.

¹⁴⁾ ombildar.

¹⁵⁾ i Paris.

¹⁶⁾ »Maison carrée»: ett litet tempel från romarnes tid, numera använt som antikvitetsmuseum.

¹⁷⁾ uttalas Nim; huvudstad i franska departementet Gard.

¹⁸⁾ etagère.

¹⁹⁾ franska: il l'exagère; »solskenet överdriver där mätten på allt, som det vidrör».

²⁰⁾ sin glansperiod.

²¹⁾ ett Kråkvinkel; en avsides belägen småstadshåla.

²²⁾ jätteträd i tropikerna.



Balbuto.

Notario S. estas sprita viro, sed li havas gravan difekton: li balbutas je neordinara grado. Malicema fraŭlino iam demandis al li: »Ĉu vi povas diri: kisi kuiristinon en kuirejo?»

Sinjoro S.: »Es-es-tas p-p-li facile fa-far-ri-te ol di-diri-ite.»

Sveda Kroniko.

Stockholm.

La 2an de januaro okazis en la salono de la bontemplanoj (I. O. G. T.) propaganda kunveno kaj festo. La festan paroladon faris la sekretario de »Verda Stelo», S:ro Rosengren. Li paroladis pri Svisujo kaj la Esperantokongreso en Bern, ilustrante sian temon per multe da ĉarmaj, belege kolorigitaj lumbildoj. Sub lia gvidado ni faris rondiran vojaĝon en Svisujo, vizitante multajn mondfamajn lokojn. Belega estis la vojaĝo sur Vierwaldstätter-lago kaj la pieda marŝado al la eterne neĝkovritaj pintoj de la Bern-alpoj, interesplenaj la vizitoj en Bern, Zürich, Luzern kaj aliaj urboj, kaj la parolanto montris unikan bildserion de la diverslandaj kongresanoj de la 9a kongreso. Precipe ŝatataj estis la esperantistaj tipoj en naciaj kostumoj, kaj humorplene S:ro Rosengren rakontis pri la internacia balo k.t.p. La parolado estis forte aplaudata. *Mefistofeles.*

Gävle.

La esperantista klubo de Gävle havis la 6an de jan. en la salono de »Tysta Mari» — Silenta Mario, sian naŭan jarfeston. La prezidanto de la klubo en Norrköping, S:ro Leander Tell, kiu tiam vizitis Gävle, faris tre bonan paroladon pri la mondlingvo. Dum la vespero S:ro Tell kun helpo de S:ro Rud. Pebrsson, ludis teatraĵon nomata »Aventuro en Budapeŝto». Ĉe la festo, kiu donis al la ĉeestantoj bonan impreson, oni ankaŭ vespermanĝis vive diskutante.

Novajo por la klubo estis de s:ro A. F. Hansson noveorganizata muzikkapelo »Esperanto», kiu dum la vespero prezentis al la ĉeestantoj sian talenton. *E. A.*

S:ro J. Helsing komencis Kurso esperantista privata la 31-an de Januaro kun 6 partoprenantoj.

Malmö.

La Esperantoklubo en Malmö elektis S:ron John Pettersson kiel delegiton de U. E. A., kaj S:ron Karl Rosengren kiel vicdelegiton.



Harold Bolingbroke Mudie †.

La tre ŝatata esperantisto H. B. Mudie mortis 6 januaro 1916 en la angla armeo en Francujo.



Holland.

Esperantokurs i Assendelft för ingenjörssoldater, 20 deltagare.

Arbetareesperantisternas vinterkurs i Rottendam räknar omkring 20 deltagare.

Polistidningen »Algemeen Nederlandsch Politie-Weekblad» innehåller en serie esperantolektioner.

Ryssland.

Det gamla sällskapet »Espero» Petrograd innehar nu en bekväm lokal (Ekaterin. kanal, 27), där sammanträde äger rum varje torsdag. Vid teknologiska institutet i Petrograd anordnas esperantoföreläsningar två gånger i varje månad, varvid, jämlikt särskilt tillstånd, även esperantister som ej tillhöra institutet äga rätt att närvara. I kvinnliga polytekniska läroverket höll ingenjör Dmitriev den 31 oktober föredrag »Esperanto och Teknik». Vid samma läroverk har bildats en esperantogrupp. Esperantokurs är anordnad i psykoneurologiska institutet.

Om Esperantosällskapet Moskva meddelas, att verksamheten är livlig ehuru många medlemmar äro frånvarande såsom mobiliserade. Svenske ingenjören Linse märkes bland föredragshållarne under senaste månaderna. Den 28 november mottog sällskapet såsom gäst Nobelpristagaren Prof. Richet från Paris. Studenternas esperantoförening höll den 22 december offentlig föreläsning om Esperanto, varvid Prof. Richet var närvarande såsom hedersgäst. En ny esperantogrupp har bildats vid femte gymnasiet i Moskva.

Esperanto är upptaget som undervisningsämne vid nya handelsinstitutet i Astrakan.

Storbritannien.

Ett stort antal esperantokurser pågå i London, bland annat i K. F. U. M. Esperantokurser i tekniska läroverken i Keighley (Yorkshire) och Gloucester samt övrigt på många platser.

Många främlingar hava åtnjutit ovärderlig hjälp av en vid Victoria-stationen i London tjänstgörande kvinnlig tolk. Två små flaggor och en grön stjärna, fästade å hennes uniform, utvisa att hon talar franska, flamländska och Esperanto.

Tyskland.

En ny esperantoförening bildad i Achim (Hannover). En esperantoförening bildad i skyttegravarna i Flandern. Esperantokurser flerstädes, bland annat i Essen med 40 deltagare, lasarettet Oldenburg, Hildesheim (arbetarnes esperantoklubb) o. s. v.

Den stora Berlinertidningen Deutsche Warte innehåller en artikeiserie om Esperantos betydelse och användning.

Vid sachsiska lantdagens sammanträde den 18 november, under debatt angående statsbiblioteket, yrkade den konservative lantdagsmedlemmen Rentsch att uppmärksamhet framdeles måtte ägnas även esperantolitteraturen. Anförandet mottogs med bravorop.

Dr Schramm i Leipzig har av konungen av Sachsen tillerkänts professorstitel för sina förtjänster om den stora bokhantverksutställningen 1914, därvid bland annat Esperantos paviljong hade Dr Schramm att tacka för sin tillkomst.

Schweiz.

I ett föredrag i Genève den 2 november framhöll en kvinnlig rysk läkare, att Esperanto under kriget gjort god tjänst och att många sjukvårdsofficerare och -soldater användade sig därav, samt att hjälpspråket kan väntas bliva av ännu större betydelse efter kriget vid återknyttandet av de internationella förbindelserna.

Österrike.

Esperantokurs Wien för lärare.

Japanske marinunderlöjtnanten Uasaj, medlem av esperantoföreningen i Jokosko, har nyligen hemkommit efter en tids vistelse i Australien, där han på bästa sätt varit mottagen bland esperantisterna, synnerhet i Melbourne.

I november sammanträdde ett franskt-engelskt krigsråd i Paris. Bland de fyra närvarande engelska ministrarna kunde endast en, nämligen Balfour, tala franska. Ingen av de deltagande franska ministrarna förstod engelska. Åter ett bevis på att intet nationellt språk kan i tillfredsställande omfattning tjäna som mellanfolkligt hjälpspråk.



Regiono de U. E. A. Kristiania, Norvegujo.

Plurjara membro de nia asocio, S:ro N. Voll, direktoro de la oficiala informkontoro de la ekstera norvega komerco, estis ĉe la lasta ŝtatkonsilo de 1915 nomita kiel ŝtatkonsulo por Norvegujo en San-Francisko, Usono.

Gravan helpanton al la delegito de U. E. A. dum tre malfacilaj tempoj tie ĉi por la progreso de nia ideo, mi kiel delegito dankis pro lia boneco kaj bondeziris al li lian gravan laboron en San-Francisko.

Skribe dankante pro la gratulo la konsulo diris, ke li en sia nova ofico emos havi atenton pri Esperanto kaj la klopodoj de U. E. A. Norvegujo, Kristiania 11. 1. 16.

Delegito.



Gävle Esperantoförening

höll den 1 dennes sitt nionde årsmöte. Års- och revisionsberättelserna, som godkändes, utvisade att föreningen under det förflutna året varit verksam. Till medl. i styrelsen valdes: ordf. C. G. Holmstedt, v. ordf. A. K. Örn, 1:ste sekr. Einar Adamson, 2:dre d:o Ellen Holm, kassör W. Wahlund, bibliotekarie G. Öhlander samt rådg. Alb. Liljemark med suppl. P. A. Hällström och A. Sandberg. Till revisorer utsågos fröken Ester Östlund och Osk. Johansson, suppl. R. Larsson. Föreningen beslutade att även i år anordna en vårkurs. Mötet var talrikt besökt och stämningen särdeles angenäm.

»Nulo».



Patrino kaj ĵilino.

— Ĉu ci ne kredas, ke la ĵuna sinjoro bezonas iom da kuraĝigo?
— Ci estas prava, panjo — ĉu ci eble povos esti for, kiam li venos.

* * *

— Kial oni diras, ke la honesteco daŭras plej longe?

— Ho, verŝajne ĉar ĝi estas uzata tiel malmulte.

Sciigo.

La kolonoj de La Espero ne estas malfermitaj por diskutoj rilate al politiko, religio kaj similaj aferoj. Se tia demando tamen estos tuŝata ĉe escepta okazo, la tiam eventuale esprimita opinio devas esti konsiderata kiel apartenanta al la verkinto de la artikolo, sed ne aljuĝata al la redakcio, nek al la Esperantomovado je ĝia tuto.



Lunbrilo!

Melankolia kaj pensopeza la nokto kuŝis super la malluma arbaro. La lunlumo sur la spegulanta akvo de la lago delikate brilis de arĝentaj strioj. Necerteco estis en la tremanta lumo, seriozeco en la muĝeto de la pinoj.

Mi staris tie ĉe la marbordo tute sola, cerbumante en la trankvila lunluma somernokto. Mia rigardo serĉis la necertan strion, kiun la ĉielo faris, tie super la arbaron. Mirindaj sentoj ĉirkaŭis min. Ŝajnis ke mi staras en rondo de kolomboj.

Bildon de la vivo! Tie ĉi mi haltas kun kaduka boato super nekona profunda. Kaj mi komencas klopodojn ĉiuspecajn, iras al la pintoj de la altaĵoj kaj falas poste malsupren en la profundaĵon. Danĝeroj loĝas sub la svingantaj branĉoj, jes ĉie. La irado ofte min lacigas kaj ŝajnas al mi tre longa. La estonto kuŝas antaŭ ni tre malklara, ĉar nia vidopovo ne estas granda. La tera rigardo preskaŭ ne sentas alie ol ombro.

Tamen, kiam tremeto de mal-kuraĝo por la malhelaj densaĵoj trankuras nin, la lumo malrapide venas kaj atingas niajn okulojn. Ofte kiam la celo ŝajnas al ni tre malproksima, la konsolo kaj la helpo estas tre proksime.

La celo! Jes, ĝi estas videbla en la malproksimo, kaj ni certe iufoje atingos ĝin.

»La vivo estas seriozaĵo, ludo ĝi ne estas!» — murmuretis al mi la muĝetoj de la arbaro. »Rigardu esperplene antaŭen» — admonis min la strianta lumo.

Jes, la vivo ofte ŝajnas malluma kaj la nunaj okazoj en la mondo

ne helpas heligi ĝin, sed tamen ni rigardu antaŭen, ĉar iam la brilanta matena suno, kiu ankoraŭ sin kaŝas, revenos kaj varmigigos la malvarmajn homojn. Ĉar en la profundo laboras sekretaj kaj silentaj fortoj, kiuj iutagon per sia amo estos kapablaj venki la mallumon. La laboro de la esperantistoj en ĉiuj landoj, jam antaŭsignas pri tiu tempo. Kaj kiel ajn forta la mallumo estas, ni povas rimarki la rebrilojn de leviĝanta suno, same kiel mi en la malluma nokto rimarkis ke la sunaj radioj iom post iom trapenetras la densajn nubojn, kiuj momente ŝajnis al mi nepenetreblaj.

Einar Adamson.



La leporkaptanto.

De Arnold Schröder.

Estis iam vilaĝano nomata Jan Hakenbus, kaj ĝendarmo kiun oni nomis »sinjoro Bode» kvankam pli multe plaĉis al li la titolo »sinjoro serĝento».

Trinkadi ili ambaŭ sciis. Jan Hakenbus trinkis holandan brandon, sed sinjoro Bode trinkis ĉion. Kiel ĝendarmo li devis scii tion. Ekzemple kiam en Lindenhof estis danc-amuzo kaj sinjoro Bode je la dekunua nokte venis por admoni pri la leĝa limtempo de la amuzo, oni povis danci po kvin minutoj por ĉiu glaso da grogo aŭ biero kiun ricevis sinjoro Bode.

Sed Jan Hakenbus ne vizitis la Lindenhofan gastejon, li trinkis hejme kaj rakontis al siaj gastoj aventurplenaĵojn rakontojn el Ameriko, Afriko kaj Aŭstralio. Komprenoble per helpo de sia »genever»-likvoro.

Sen »klara trinkajo» de *Hullmann* aŭ »Genever» de *Dorenkat* el nordo, la Oldenburganon ne povas ekzisti, precipe kiam li estas gastejmastro aŭ legomkulturanto.

Ad vocem — legomoj! Ĉiu homo povas ĝoji pri sia legomo, sed ankaŭ koleri li povas pro ĝi, nome kiam tiu ĉi legomo estas ruinigita aŭ formangita de abomenindaj homoj aŭ bestoj. Tio okazis al la brasiko de Jan. Leporo, tute ordinara Oldenburga leporo formangis la brasikon. Jan Hakenbus tre baldaŭ rimarkis, ke la brasiko estas ĉirkaŭmordita. Li rapide komprenis, ke tion kaŭzas mordetulo, nomata leporo. Jan aĉetis

ŝnuron, lerte aranĝis kaptilon el ĝi, por kapti la leporon. La leporoj eniris la ĝardenon pere de truon en la barilo, ĉirkaŭanta la ĝardenon, la aranĝo de la kaptilo estis do tre facile farebla, kaj ĝi montris sin taŭga, ĉar tuj en la unua nokto kaptiĝis »*lepus timidus*«. La sorto de la kaptito — laŭ la decido de la homoj — estis la morto, kaj poste ili manĝis ĝian bonguste preparitan viandon. Jan Hakenbus kaj lia edzino kun bona apetito ĝuis la leporojn, sed la plezuro ankoraŭ ne estis finita. Okazis, ke nokte post nokte kaptiĝis leporo — kaj tio mirigis la najbarojn. Precipe najbaro Buschmann*) koleris pri tio, li estis kamparana rentulo kun malica karaktero. Buschmann observis la kaptadon kaj rakontis tion al alia najbaro, kaj tiu kompreneble siavice rakontis la historion al aliaj najbaroj kaj unu el li komunikis ĝin al la maljuna instruisto (nomita preĝejservisto Joost). Kiam tiu ĉi sciigis pri la okazintaĵo, li tuj vestis sin per sia dimanĉa surtuto kaj, irinte al sinjoro Bode, li rakontis plej detale pri la afero. Sinjoro Bode »antaŭflaris« ion punindan. »Ho, ho« li pensis, »ĉaskrimo, ŝtelado de ĉasaĵo, ho ni kaptos vin!«

»Jen vidu«, diris la preĝejservisto, »li kaptas la leporojn per kaptilo el ŝnuro, kiun li firmigis antaŭ truon en sia barilo. De la kaptilo kondukas alia ŝnuro en la domon, kaj kiam kaptiĝis leporo tiam sonorileto sonoras en la ĉambro, ĉar tie li firmigis la ŝnuron al sonorileto.«

La suspekto nun montriĝis pravigita, tial sinjoro Bode ankoraŭ en la vespero de la sama tago iris al Jan Hakenbus por kapti lin rekte dum la krima ago. Kompreneble sinjoro Bode eniris la ĉambron kun plej senkulpa mieno kiu esprimis eĉ ne ombron de kaŝita suspekto, Li mendis »Hullman'an« trinkadon, poste li atendis. Sed Jan Hakenbus estis ruzulo, li tuj komprenis, kial sinjoro Bode venis kaj kial li tute ne montras intencon foriri.

Subite eksonoris la malgranda sonorileto — bimbim.

Sinjoro Bode kviete demandis kion signifas tiu ĉi eksonoro, kaj Jan same kviete respondis: »Estas leporo!«

»Kion? Leporo?«

»Jes«, respondis Jan, »ĝi firme kaptiĝis tie malantaŭe en mia ĝardeno, la friponoj ne volas indulgi mian brasikon, tial mi kaptas ilin.«

Sinjoro Bode senparole kaj en plej granda konsterniteco aŭskultis tiun ĉi sinceran konfesion. Jam li intencis meti sian manon sur lin, ĉar la krimulo jam konfesis, sed Jan malhelpis la areston, ĉar afable li diris: »Sinjoro Bode, vi povus iri kun mi en la ĝardenon, por mem vidi kiel bele kaptiĝis tiu sinjoro longorulo. Estas jam la dekdua leporo dum ok tagoj!«

Tra la animo de la uniformon portanta Oldenburgano flugis triumfanta tremeto, li ekpalpis sian malantaŭan surtut-poŝon por certigi, ĉu estas tie la man-ĉenetoj, kiuj decas por tia grava krimulo. Jan Hakenbus kaŝe metis ion sub sian jakon kaj nun ili kune iris en la ĝardenon, Jan irante antaŭ sinjoro Bode. Tiu ĉi lasta preskaŭ ne plu povis reteni sian arestemon. Jan liberigis la leporon el la kaptilo, tenante la longajn orelojn per sia forta maldekstra mano. Poste lia dekstra mano el-tiris ledan vipeton el sub la jako kaj senkompate batadis la felon de la kompatinda leporo. Fine Jan jetis ĝin per granda eksvingo de la brako super la barilo sur la kampon kaj poste diris al sinjoro Bode: »Vidu, tiu ĉi fripono ne plu revenos; tio efike helpas kontraŭ ĝia vizito. Tiel mi ĉiam faras, kiam leporo kaptiĝis — mi forte batas ĝin kaj poste reĵetas ĝin sur la kampon. Sed nun ni iru en la domon, sinjoro Bode, ni trinku ankoraŭ glaseton.«

El germana lingvo tradukis

Ella Scheerpeltz



Libroj kaj Gazetoj.

Esperanta Krestomatio el verkoj de 42 diversnaciaj aŭtoroj. El-laboris A. A. Saĥarov, instruisto de Moskva Instituto de Esperanto, Eldonita de Librejo »Esperanto«, 3 Lubjanskij pr., Moskvo. Prezo 15 kop. (Sm. 0,160).

Poŝformata legolibro kun enhavo aranĝita laŭgrade, t. e. ke la unuaj tekstoj estas pli mallongaj kaj ĝenerale pli facilaj ol la poste metitaj. Ĉiuj tekstoj estas bonstilaj, kaj se oni diras ke kelkaj el ili estas pli facilaj ol la ceteraj, tio ne signifas ke la postaj artikoloj estas malpli klarstilaj ol la unuaj, sed nur ke iliaj temoj estas pli specialaj, dum

la unuaj tekstoj prezentas la ĉiutagan parollingvon. La tekstoj estas ĉerpitaj el tre diversaj fontoj. Kompreneble kelkaj el ili estas iom banalaj anekdotoj — tio estas ja neeviteble en tiaspeca libro, kaj ne malgrandigas la valoron de ekzerc-legaĵoj — sed la kompilinto estas dankinda ĉar li elektis ankaŭ pli valorajn tekstojn. Pro ekonomia kaŭzo la libro estas tre dense presita, kaj do la enhavo estas tre grandkvanta kompare kun la malgranda amplekso de la libro. Oni povas rimarki, ke kelkaj difektitaj literoj eble embarasos ĉe la uzado. Tamen la libro estas certe uzinda ankaŭ al svedaj novesperantistoj por pliperfektigo post la komenca lernado.

Världsspråksfrågan — en livsfråga. Av Einar Adamson. Gävle Bokförlag, Gävle. Pris 25 öre.

Propagandobroŝuro sufiĉe ampleksa, dediĉita precipe al membroj de gejunulaj organizaĵoj. La aŭtoro tre forte montras kiel grava la neŭtrala helplingvo devas esti por la emancipado de la malpli potencaj nacioj — ekzemple ni svedoj mem. Li donas kelke da ekzemploj pri subpremo de dependaj nacioj, kaj ni povas ja aldoni ke la plendoj ĉie estas egalaj, kiel ankaŭ la ĵaluzo de la plipotencaj nacioj. Vidu ekzemple Belgujon, kie la flandoj nun fine — dank' al la cirkonstancoj — ricevis universitaton kun instruado en ilia nacia lingvo, kiun la franc-lingvaj samregnanoj ĉiam kontraŭbatalis por la »nacia« unueco, t. e. por la supereco de sia lingvo. Vidu la klopodojn de la katalunoj. Pripensu la situacion de la germanregnaj poloj kaj danoj — kaj de la irlandia nacio sub la angla potenco. Imagu, kiu ree estus la sorto de la elzasanoj, se ilia lando estos militakirata de fremda regno. Pripensu la centojn da vivoj, kiujn la Serbujaj aŭtoritatoj estingigis por ekstermi albanojn kaj bulgarojn en la militakirita Makedonio — kaj esperu ke la makedoniaj serboj nun havos pli facilan sorton. Tiu listo povus esti tre longa.

Sed la aŭtoro kelkloke uzas tro fortajn esprimojn kiam li priskribas maljustaĵojn kontraŭ malgrandaj nacioj en grandaj regnoj. Tiaj troigoj eble malakcelas la efikon de la cetero ĝusta pruvado. Se iu nacio en sian lingvon enkondukas vorton de fremda deveno, oni faras tion pro bezono (aŭ kelkfoje pro dandeco), sed ne pro malhonesteco. Tia vorto

*) elparolu Buŝman.

ne estas ŝtelita (paĝo 9, linio 9), sed akirita tute lojale, kaj nenio malhelpas ĝian konservadon en la origina lingvo. La organizintoj de la Ruslandaj praregnoj enkondukis en la tiean lingvon vortojn ankoraŭ vivantajn: lĵekar (kuracisto, svede lĵkare), k.t.p., sed ni neniel diru ke la rusoj ŝtelis tiujn vortojn — nek ke ni mem perdis ilin. Kelkloke la evidenta senco ne estas ĝuste esprimita. Supozeble la plejmulto de la grandrusoj estas malriĉaj vilaĝanoj, sed la aŭtoro diras la malon (paĝo 5, linioj 22—23).

La aŭtoro iuloke prituŝas malgravajn lingvosistemojn, el kiuj li mencias la piĝeonfrancan, neĝuste komparante ĝin kun Esperanto kvazaŭ ĝi povus eble esti samvalora. Eĉ li preskaŭ ŝajnas supozi, ke kono de la germana lingvo plifaciligus lernadon de tiu eksperimentlingvo. Li estas prava kiam li diras, ke la nomo de la helplingvo estas indifera, sed ne estas indifera, ĉu la lingvo estas pli aŭ malpli neŭtrala kaj cetere bona, nek ĉu lingvo estas uzebla ofte aŭ preskaŭ neniam.

Kvankam ni do devis noti kelke da rimarkoj, ni tute konsentas je la esenca argumentado, kaj eĉ deziras ke ĝi kelkloke estus ankoraŭ pli akra. Al la malgrandaj nacioj la helplingvo vere estas tre grava. Tio ĉi ne koncernas ekskluzive malgrandajn naciojn en grandaj regnoj.

Ni sincere rekomendas la broŝuron, precipe por diskonigado en tiuj rondo, al kiuj ĝi estas destinita.



Korekto.

En la alvoko »*Til de norske abonnenter*» en nia decembra numero troviĝas la malkorektaĵo »Kontingenten er fremdeles kr. 1,75». Tamen la kotizaĵo por 1915 estis kr. 1,60, kaj ĝi estas 1,75 nur de 1916.

La kaŭzo de la eraro estis, ke la sveda redakcio, legante la presprovaĵon, malatentis la gravan diferencan inter la norvega vorto »fremdeles», kaj la sveda »framdeles». La senco de la unua vorto estas: daŭrige, kaj de la dua: en estonta tempo.



Por temppasigo.

Solvoj de la problemoj en la januara numero:

4. Spiko malplena plej alte sin tenas.

5. Ĉapo. Enuo. Vido. Avelo. Lilio. Ovo. — Ĉevalo. Pudelo.

6. Sukero.

7. Anstataŭigu per literoj la ciferojn 1 2 3 4 5 6 7 8, kaj vi trovos muzikan instrumenton. — El la sama vorto la literoj 1 6 2 8 estas grundo, 1 2 3 5 0 teatra artistaro aŭ aro da soldatoj. 1 2 3 7 0 fiŝo, 5 6 7 8 deziresprimo, 2 3 4 8 alkoholaĵo, 2 3 1 8 herba vegetaĵo, 2 6 7 8 fiŝkaptilo, 5 3 1 8 truo fosita en tero, 5 3 7 2 8 fiodoranta stato, 7 6 4 8 tio, pri kio oni parolas, 1 6 8 trinkaĵo preparita per sekigitaj folioj, 1 6 4 5 8 daŭro kaj 1 6 7 2 8 birdo.

Solvo en la marta numero.

Kunlaborado estas petata por tiu ĉi fako.



Edzo kaj edzino.

Viro kune kun sia edzino promenas en neĝvetero. Ŝi portas korbon kaj kelke da paketoj. Li iras kun manoj en la poŝoj. Bubgrupo ekvidas ilin, kaj tuj venas kelkaj neĝbuloj, trafante la edzinon. La viro forigas la neĝon de ŝiaj mantelo, ĉapelo kaj haroj, skuas la pugnon kontraŭ la buboj, kaj diras:

»Estas feliĉe al vi, buboj, ke vi ne trafis min!»

*


Bruligita infano timas fajron.

La fajrobrigado en malgranda provincurbo estas fama pro sia rapideco.

Inspektoro de asekurinstytucio unufoje inspektis la brigadon, alarminte ĝin. Post iom da tempo li volas ripeti la provon, kaj alarmas. Vane atendinte rezultaton, li iras al la signalcentro, kie staras policisto rigardesplorante pri la brulloko.

La inspektoro: »Kial ne venas la fajrobrigado, kiam ĝi estas alarmita?»

La policisto: »Mi supozis, ke estas trompaĵo ankaŭ nun!»



Gävle Esperantoförening

Ordinarie månadmöte avhålls tisdagen den 7 mars kl. 8 e. m. å föreningens lokal, N. Kungsgatan 5, 2 tr. (Lundgrens Handelsinst.).

Anmälningar till deltagande i kurs mottagas å Kafé Esperanto.

Esperantister! Besöken konversationsaftnarne varje torsdag kväll kl. 8 å lokalen N. Kungsg. 5, 2 tr.

La Esperos garantifond.

Tecknade andelar:

	Trpt. 425:—
John Lundgren, Hedemora	10:—
Peter Ekman, Eskilstuna	10:—

Summa Kr. 445:—

Gävle den 31/1 1916.

Gävle Esperantoförening.

S. E. F.

Inbetalda årsavgifter för år 1916:

Andersson, A. Th., *Jugansbo*.
Johansson, Axel, Övernora, *Dala Husby*.
Sandell, O., *Jönköping*.
Landin, J. L., *Prästmon*.
Tibbling, Eva, *Norrköping*.
Östling, Anton, *Styrmansgatan 36, Norrköping*.
Eliasson, J., Fru, *Norra Strömgat 39, Norrköping*.
Fransson, Er., *Luleå*.
Lindén, Frits, *Lindsås, Borgstena*.
Ljungberg, Alice, *Elektr. Kvarnen, Tun*.

Hansson, Harry, *Blåsutg. 7, Göteborg*.
Brännlund, Alb., *Skeppargatan 10, Sundsvall*.

Gallon, A., *Kafé Linnea, Sandviken*.
Carlsson, M., *N. Långgat. 1, Trälleborg*.

Pettersson, A., *Stamsjöhult, Lerum*.
Lindström, H., *Stadshotellet, Borås*.
Asplund, N., *Västermalm, Eskilstuna*.

Asplund, Signe, Ing. *Cedervall, Fagersta*.

Elfving, N. A., *Åsgat. 5 a, Västerås*.
Fabricius, Mimmi, *Majgården, Gnesta*.
Ekman, Peter, *Eskilstuna*.

För 1914:

Ekman, Peter, *Eskilstuna*.

Kvitteras Gävle den 24/1 1915.

J. Helsing, *Kassör*.

HERRAR
EKIPERA SIG BÄST OCH
FULLSTÄNDIGAST HOS
Axel Lidholm
Drottninggatan 30 -:- GEFLE

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe
FRANS A. OLSON
Telef. 34 GEFLE Telef. 34

Speditioner
Magasinering av varor
EXPRESSBOLAGET I GEFLE
Rt. 1759. Telegramadr. ÅLENIUS.

Josef Wikströms
Tobakshandel
GEVALIAPALATSET GEFLE

Central- och Jernvägshotellen
GEFLE
REKOMMENDERAS!

LA NOVA TESTAMENTO
LEDA BINDO
Kr. 2:50 (+ porto 0:30 kr.)
»La Esperos» Expedition,
GEFLE


SKODON
Största sortiment hos
A. M. Zimmerman & C:o

C. J. LINDH
BOK- & DISTRIBUTIONSAFFÄR
S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE
Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.
RIKSTELEFON 1697.

ESPERANTISTER!
Köp och drick den verkligt goda njut-
nings- och sällskapsdrycken
ESPERANTO PUNĈO
Alkoholfri.
REKV. FRÅN ANTON ÖSTLING,
Styrmansgatan 36, NORRKÖPING.



ESKILSTUNAKVARNEN "SVEA"
Av hrr lantbr. välkänd. Över 600 st. sålda.



Bästa husbehovskvarn
lättgående, lättskött.
Med patent skyddad
konstruktion. I 4 stor-
lekar! Krossar och grö-
per alla sädeslag; fin-
maler för brödbakning.
Liggande, massivt gjut-
na självsjärpande ste-
nar; fjädrande skydds-
anordning, S. K. F. kul-
lager; liggande eller stå-
ende remskiva. Se upp
för efterapningar.
Sveasikten, i kombina-
tion med kvarnen utgör
ett helt kvarnverk för
husbehov. Begär pris-
kurant o. intygssamling.

A.-B. EKMAN & BRUNNKVIST
Eskilstuna. Rt. 1075, 1066.

Nyutkommen broschyr:
Världsspråksfrågan - en livsfråga
av Einar Adamson.
Pris 25 öre. Rabatt då minst 10 ex. rekv.
Rekv. från **Gävle Bokförlag, Gävle.**

Carl Larssons
FOTOGRAFIATELIER
NYGATAN 34
Rekommenderas!
TELEFON 357

Wickmans Kappaffär
NORRA KUNGSGATAN 7 GEFLE
Vid Rådhusplanaden.
Kappor o. Promenaddräkter i stort uryal.
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.
RIKSTELEFON 1391.

Från "La Esperos" Expedition, Gefle,
kan rekvireras utkommen litteratur m. m.
Å lager finnas **Läroböcker:**
Lärobok i Esperanto av
P. Nylén..... 1: — + porto 0: 12
Lärobok i Esperanto av
G. H. Backman 1: — + 0: 16
Lärobok i Esperanto av
Carl Ohlsson 0: 50 + » 0: 08
(Alla med Esp.-svensk ordlista)
Esperantospråklära av
O. W. Hjærtstätt 0: 40 + porto 0: 08
Esp.-svensk ordbok av
P. Ahlberg 1: 75 + 0: 16
Svensk-esp. ordbok av
E. L-son Finn ... 1: 50 + 0: 12
Esp.-svensk o. Svensk-
esp ordbok av Hjært-
stätt 0: 60 + 0: 08
Unua Legolibro av Dr.
Kabe 1: 60 + 0: 12
Nova Testamento
(mjukt band) 2: 50 + 0: 30
"La Espero" oficiala
himno esperantista,
med musik 0: 60 + 0: 04
D:o d'o, propagandablad 0: 05 + 0: 04
Sveda Kantaro, kun me-
lodioj 0: 35 + 0: 08
Esperantista Kantaro... 0: 75 + 0: 04
Världsspråksfrågan - en
livsfråga av E. Adamson 0: 25 + 0: 04
Esperantostjärnor 0: 75 + 0: 10
D:o, (officiella, för med-
lemmar av U E A.) 1: + 0: 10
D:o, (miniatyr) 0: 35 + 0: 10
Esperantobordsflaggor 2: 40 + 0: 30
D:o (något enklare) 1: 75 + » 0: 30
D:o (mindre) 0: 85 + » 0: 30
Esperantoflagga 0: 50 + » 0: 08
D:o (miniatyr) 0: 15 + » 0: 04
Reklammärken, 25 st. 0: 45 + » 0: 04

Gust. Holms Förstoringsanstalt
Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 1628.
Faras pligrandigojn laŭ fotografajoj.
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!

Vartför skall Sverige stå efter
de stora länderna i fråga om Espe-
rantos spridning?
Rekvirera propagandabladet och visa
alla Edra bekanta!
Pris för 3 st. 10 öre, 100 st. 1: 35,
500 st. 6: — och 1000 st. 10: — allt
portofritt från

Sveda Esperanta Federacio, Gävle

N. Lundgren
GEFLE Interurba tel. 151
Kamentuboj por fabrikoj.
Pli ol 800 konstruitaj.
Riparoj dum uzado.
Fulmkondukttiloj estas muntataj.
Propra brikejo en Upsala.
Plej granda firmo por konstruo de
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.
Argenta medalo en Stockholm 1897
, , , Gefle 1901
, , , Norrköping 1906

För nybörjare
är en grundlig **Korrespondens-**
Kurs i esperanto utarbetad av
undertecknad. Begär prospekt!
R. PEHRSSON, 3-23, Gävle.

Esperantopapeterkartong, 25 ark brevpapper +
25 kuvert, damf. 1: 50
" d:o, d:o, herrformat 1: 65
Esperantocopiepennor, 30 öre st., 3: — kr. dussin
(hårda eller lösa).
Esperantoblyertspennor, 10 öre st., 1: — kr. duss.
(hårda eller lösa).
Allt franco.
Beställes hos **W. Wahlund, Gefle.**